

nepre kaŭzas dubon aŭ miskomprenon. Ni povas enkonduki la terminon „proksimala” por antaŭa. Sed ĉu ni efektive bezonas tiujn vortojn „proksimala” kaj „distala”? Ne mi kredas. Oni tute klare povas paroli pri antaŭa kaj malantaŭa aspektoj anstataŭ proksimala kaj distala aspektoj, kaj pri antaŭa kaj malantaŭa flankoj de iu parto anstataŭ proksimala kaj distala flankoj.

Nun en la atlaso ankaŭ troviĝas terminoj, kiaj „mezoproksima” kaj „distoproksima”. Se ili estas transprenoj el la dentoscienco mia kritiko ne nur direktas sin al la transpreno, sed ankaŭ al la dentoscienco. Se „mezoproksima” indikas la medianon kaj la antaŭon samtempe, la indiko estas malklara, se ne malebla. Tio eĉ pli validas por „distoproksima”, kiu vorto kombinas du kontraŭajn nociojn. Tio estas sensencaĵo. Laŭ la desegnoj „mezoproksima” simple staras por antaŭa kaj „distoproksima” simple por malantaŭa. Interparolo kun dentisto konfirmis tion.

La termino „okluda” (o-kluda, ne ok-luda) malsamas la terminon uzitan de Briquet „okluza” („malfermaĵa”), kiu ŝajnas al mi preferinda.

Alia termino el la atlaso estas „abrazio” por defrotado. La vorto ne estas en P.V.¹⁾ Oni povas demandi, ĉu „abrazo” ne estus pli bona, simile al okluzo.

Mi bedaŭras ke la papero de la tekstlibro estas malbona kaj tiu de la bildfolioj ne sufiĉe fortika por elteni oftan manipuladon. La atlaso aspektas tiom taŭga, ke pli bona papero estus motivita. — G. F. M.

581(023)=089.2

La Vivo de la Plantoj far Paul Neergaard; eldono de Stafeto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1957. 17 × 25 cm², 128 p. Multaj ilustraĵoj far Mads Stage Prezo: 2 us. dol. aŭ 12 danaj kronoj aŭ egalvaloro.

La apero de ĉi tiu libro devas esti anoncata kiel evento. Ĉar la konata eldonejo „Stafeto”, kiun ni dankas jam pro tuta serio da valoraj libroj, komencis novan serion, nome popularsciencan.

En tiu librospeco, kiu povas esti por la Esperanto-movado tre grava, kaj kies reprezentantoj ĝis nun malabundas en nia lingvo, D-ro Neergaard malfermas la vicon, per verko kiun li pli frue aperigis en la dana lingvo. En Danlando la recenzoj juĝis ĝin tre bona.

Nu, se oni ankoraŭ ne sciis el la ISU-prelegoj, oni povas tuj konvinkiĝi per tiu ĉi libro ke Neergaard komprenas kiel oni popularigu la sciencan, en ĉi tiu kazo la botanikon. Lia stilo estas suka,

¹⁾ Ĝi troviĝas, tamen, en la ĵus aperinta „Grand Dictionnaire Esperanto-Français. — W. P. R.

bildriĉa kaj ofte bela. Lia traktado de la materio estas didaktike prava, klara kaj trafa. Sen troigo oni povas diri ke instruado estas arto, kaj jena libro pruvas ke Neergaard majstras en tiu arto. Unu el la faksekretoj estas enkonduki sciencajn problemojn deirante de simplaj kaj konataj eĉ hejmecejaj fenomenoj. Alia estas uzi plastikecajn imagaĵojn kaj komparojn. La libro enhavas multajn ekzemplojn de celtrafa popularigado. Tamen, hiperboloj povas ankaŭ vekti erarigan imagon, kiel ekz. sur p. 57, kie temas pri la kerndividiĝo. Heredeco estas aludita per la vortoj memori kaj noti. La manovroj de la kromosomoj logas la aŭtoron paroli pri „dancado”, „ritmo de baletto”, „lumradioj de lumĵetiloj” ktp., sen sufiĉa indiko pri la vera rapido kaj karaktero de la fenomeno. Por laikoj tia hiperbolado ŝajnas al mi malrekomendinda.

En ok ĉapitroj ni vagas tra la naturo kaj samtempe tra la botaniko por ekkoni kiel plantoj estas konstruitaj, kiel ili kreskas, vivas, floras, sin reproduktas, sin defendas kaj mortas. Por anticipe forpreni miskomprenon: la libro ne estas lernolibro, eĉ ne kvazaŭa. Ĝi pli impresas kiel literaturaĵo pri plantoj sur sekura, scienca bazo; por tio la reputacio de la aŭtoro estas garantio.

La ilustraĵoj estas konforme la tekston: tiel precizaj kaj sciencaj, kiel artaj. Mads Stage sin montras tre kapabla desegnisto, kiu evidente estas kaptita de la granda ornampovo de plantaj objektoj, ĉu floroj, ĉu dornitaj branĉoj, ĉu putrantaj fruktoj.

Kaj el la laboro de Neergaard kaj Stage naskiĝis verko, tute kontrastante kun botanika lernolibro. Rigardu kiel gracie la figuroj estas ordigitaj sur la paĝduoj, kiel la ilustraĵoj estas kombinitaj kun la teksto. Papero kaj letertipoj fortigas la artan tutimpreson. Jen ni spertas ke scienco kaj arto bonege povas harmonii.

Pri la terminaro (4½ paĝoj) mi volas fari kelkajn rimarkigojn. Kelkajn terminojn mi opinias superflujaj: *diurno* por *tagnokto*, *kondensi* por *plidensigi*, *masklo* por *virseksulo*, *permeabla* por *tralasiva*, *pluki* por *deŝiri*, *leĝera* por *malpeza*, *kurta* por *mallonga*. La vorto *kurtaga* estas laŭ mia gusto malpli bona ol *mallongtaga*, nocio ofte uzita en la verko. Oni ne tro multe pruntu el la terminaro de la poetoj.

Bonegajn plantnomojn kaj terminojn Neergaard prezentis: *ĉelmuko* (protoplasmo), *ĝermingo* (koleoptilo), *sukpremo*, *sukstreĉo* (*turgescence* en la angla), *falfoliaj arboj*, *ezokfaŭko*, *kaskofloro*, *kavalirsprono*, *nuda virgulino* estas klaraj terminoj kaj trafaj hejmecejaj plantnomoj.¹⁾

¹⁾ Kelkaj nacilingvaj plantonomoj estas sufiĉe internaciaj, kaj do tradukindaj en Esperanton per simila esprimo. Multaj nacilingvaj plantonomoj, tamen, ne estas internaciaj, aŭ estas nur ŝajne internaciaj pro tio ke ili estas laŭforme similaj, sed malsamsignifaj. Kiam mi legis ĉe Neergaard la esprimon „herbo de Sankta Johano” mi tuj pensis pri *Hypericum perforatum*, ĉar ĉi tiu hiperiko havas similajn nomojn.

En la listo ne troviĝas la termino *drupo* uzita sur p. 89. *Floemo* estu difinita simile al *ksilemo*: malsimpla histo, kunmetita el diversaj eroj ktp. Paroli pri *ksilemoj* kaj *floemoj* por *ksilemaj tuboj* kaj *floemaj tuboj* (p. 11) ne estas ĝuste.

Kelkaj riproĉindaĵoj estas jenaj: *situataj* anstataŭ *situantaj* (p. 10), *aerdensa* estu *aerbara* (p. 26), *knabineto* estu *filineto* (p. 51), *grundo* estu *tereno* (p. 51), *ventolilo* estu *ventumilo* (p. 59), *konikoj* estu *konusoj* (p. 74), *miljaroj* estu *mil jaroj* aŭ *jarmiloj* (p. 108), *vegetala* estu *vegetaĵa* (p. 114), *kreskopunkto* estu *kreskopinto* (p. 119), *ŝtofŝanĝo* estu *substancŝanĝo* (p. 119).

Preseraroj preskaŭ forestas. Ĝenas ke sur paĝoj kie komenciĝas aŭ finiĝas ĉapitro, kaj kie ilustraĵo troviĝas ĉe la bazo, la paĝonombro mankas. Tiel la uzebleco de la libro estas oferita al ĝia estetiko.

Malgraŭ tiuj rimarkigoj nur grandan laŭdon. — G. F. Makkink.

840-1 (Baudelaire 1) : 8.03 = 089.2

Charles Baudelaire. — **La Floroj de l'Malbono**. Kompleta eldono aranĝita laŭ nova ordo kaj sekvata de **La Defalajoj** kaj de **Fragmentoj rilataj al La Floroj de l'Malbono**. Esperantigitaj el la franca de pluraj tradukintoj sub la redakto de Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien. Kun du portretoj de la poeto. Kovrilo de John Hartley. Stafeto, Belliteratura Eldonserio, n-roj 8-9. Eld. J. Régulo Pérez, Kanariaj Insuloj, 1957. 400 p. 22.5 × 16 cm². Prezo \$ 2,40.

en la angla, germana, nederlanda, kaj eble en aliaj lingvoj. Montriĝis, tamen, ke Neergaard uzas ĝin, kredeble laŭ danlingva ekzemplo, por *Sedum purpureum*, kiu en la nederlanda lingvo nomiĝas „ŝlosilo de ĉielo”, kiun nomon la germanoj uzas por primolo! En la nova, ankoraŭ recenzota „Grand Dictionnaire Esperanto-Français” mi trovis la esprimon „*buterfloro de la diablo*” por leontodo, kiun Neergaard nomas „*leondento*”. En la nederlanda lingvo la *Leontodon* nomiĝas *leondento*, sed *Taraxacum officinale*, kiu en la nederlanda lingvo nomiĝas *ĉevalfloro*, nomiĝas en la germana „*Löwenzahn*” kaj en la angla „*Dandelion*” (el la franca „*dent de lion*”), do „*leondento*”, dum mi trovis por la franca lingvo la nomon „*hundodento*”. La francan vorton „*pissenlit*”, kiun Waringhien donas kiel tradukon de „*leontodo*”, mi ne trovis. Aliparte, la nomo „*buterfloro*” (eĉ se de la diablo) pensigas nederlandanon kaj anglon kredeble pri ranunkolo. P.V. aldonas sub „*leontodo*”: *Taraxacum dens leonis*, verŝajne sinonimo de *Taraxacum officinale*. Ankaŭ ĉiuj aliaj vortaroj konfirmas la supozon, ke „*leontodo*” estas *Taraxacum* kaj ne *Leontodon*. Ĉi tiuj nomoj do estas tre konfuzaj. De kie Waringhien prenis sian „*buterfloro de la diablo*” mi eĉ ne povas konjekti. Interese estas ankoraŭ ke la nederlanda lingvo havas vorton samsencan kiel „*pissenlit*”, nome „*pissebed*”, kiu signifas ne planton, sed beston, nome oniskon. El ĉio ĉi - finfine nur kelkaj malmultaj ekzemploj pri ofta fenomeno - ni devas konkludi, ke ni devas esti treege singardaj enkondukante nomojn de plantoj kaj bestoj, por eviti teruran konfuzon. — W. P. R.

Ni konstata tuj, ke ĉi tiu bela libro estas pli ol nur traduko; ĝi estas ankaŭ nova eldono, kiu aranĝas la kompletigitan poemaron laŭ nova ordo surbaze de severe sciencaj kaj estetikaj kriterioj. Alivorte, ĝi celas esti, kaj estas, kontribuo al la tutmonda pristudo de tiu famekonata verko kiu estas *La Floroj*, kaj neniu ties studanto povas de nun ignori ĝin, se li volas esti konsiderata vere erudiciulo pri sia temo. Per ĉi tiu libro do Esperanto eniras, se ĝi ne jam eniris, la sferon de la alta erudicio, havonte la prestiĝon kaj la rajtojn kiuj rezultas de tia pozicio; kaj Esperantistoj havas la devon, akceli ĝian enpenetron en tiajn universitatajn rondojn, sciigante pri ĝi ĉiujn koncernatojn.

Sekvas, ke eĉ por la nefakulo la 36-paĝa Enkonduko estas ensorĉa dokumento, kies kerno konsistas en la provo, konvinke sukcesa, eltrovi la respondon al du demandoj: el kiuj poemoj vere konsistas *la Floroj*, kaj kie devas esti enmetitaj la poemoj ĝisnun tenitaj ekster la kolekto? S-ro Waringhien, ekzamenante la historion de la diversaj eldonoj, sukcesas identigi la poemojn kiuj sendube, laŭ la origina plano de Baudelaire, apartenas al la *Floroj*; kaj tiam komenciĝas la plej ekscita kaj, pro sia neevitebla subjektiveco, plej delikata laboro, trovi precize la lokon, kie ĉiu el la novaj poemoj plej taŭgas. Nur iu, kiu ĝisfunde konas la poemojn kaj la menson de la poeto povus entrepreni tian taskon; kaj Esperanto estas bonŝanca, ke inter ĝiaj adeptoj troviĝas tia konanto. Nia Esperanta eldono distingiĝas do interalie per la aldono al la *Floroj* de 18 poemoj, kiuj estas, ne lokitaj kune en unu bloko, sed dislokitaj po unu aŭ du inter du poemoj similaj laŭ tono aŭ enhavo. La rezultato estas granda gajno en homogeneco kaj tre verŝajne prezentas la intencon de Baudelaire mem.

Ke Baudelaire estis tre granda poeto, pri tio la legantoj de S.R. apenaŭ bezonas sciigon. Poeto, al kiu Victor Hugo skribis, ke li kreis „novan ekstremon”, devis havi kvalitojn distingantajn lin disde ĉiuj antaŭaj verkistoj. Pro diversaj kaŭzoj Baudelaire ne estis normala homo, do li ne povis reagi normale al la mondo kiu lin ĉirkaŭis. Li malamis la burĝan vivon kun ĝia hipokriteco kaj ĝiaj materialismaj principoj. Se tio estas la realeco, nu, pli bone la artefariteco! Do Baudelaire venis al la konkludo, ke la homa naturo estas funde difektita kaj ke la veraj virtoj kaj belo estas artefaritaj. La troa sentemeco de lia animo igis lin, unuflanke, fuĝi el la realo en mondon fantazian, kaj, aliflanke, defii la mondon per la eĉ troigita realismo de siaj temoj kaj esprimoj. Kun ĉi tio estas kunligita tio, kion S-ro Waringhien nomas lia ambaŭvaloreco. Apud preskaŭ kristana mistikismo ni trovas ĉe li paganan voluptecon; la diablon li samtempe abomenas kiel fonton de ĉio malbona kaj kompatas